

Gazeto *Andaluzia*

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

11-a Jarkolekto ■ Marto, 1994 ■ N-ro 37



GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado de Correos 864, 29080 Málaga. DEPÓSITO LEGAL: MA-1.136/86. IMPRIME: COPISERVIC, c/ Panaderos, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO, José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

ENHAYO

Efika Esperantismo /4	3
Solvoj	4
Malago, HEF-Kongresurbo 1994	5
Realisma Kongreso	8
Poezia Angulo	10
Krucvortoj	12
10 Sciindaj aspektoj pri...	13
La instruado de Esperanto en Hispanio	14
Frank Buckley 80jara	16
$E = mc^2$	17
La Eŭropa Unio	18
TEC	20
Provizora Programo de la HEF-Kongreso'94	21
La danco de la milionoj	22
La alia danĝera lingvo, la cigana	23
Esperanto Aplikata	24

Ĉemane vi havas taŭgan ilon.

Vi trovos sciigojn pri kulturo kaj ekonomio, pri ĝenerala kaj E-a kulturoj.

Ĉe ni estas bezonataj tre kapablaj aktivuloj kiuj devas agadi per nia internacia lingvo en siaj rondoj.

For helpi vin koni E-on kaj ties movadon, travivi la Internan Ideon kaj apliki la lingvon, ĵen alia numero de nia revuo.

Etika Esperantismo /4

Ni esperantistoj pro propra aparta sperto povas vidi, ke nia esperantismo ne havas reeĥon en la socio, kvazaŭ tuta nia klopodado estus vana. Ni ankaŭ povas vidi, ke la ĝenerala opinio entute ne akordiĝas kun niaj vidpunktoj ne nur pri la lingvo, sed des malpli por nia revo pri paco kaj homa interkompreniĝo. Cetere, ankaŭ ni povas konstati, ke post la disfalo de la komunismo en Rusio kaj la daŭra interna milito en Jugoslavio, multaj restas sen gvidideo pri la dezirinda envojigo de nia civilizacio. Rusio ĥaosigās kaj disigās simile al la elfalo de la Romia imperio. En Jugoslavio alfrontiĝas ĉiu etno kontraŭ ĉiuj aliaj. La Okcidenta Eŭropo trovas preskaŭ nesupereblajn obstaklojn por sia unuiĝo.

Intelektuloj kaj politikistoj proponis kaj impulsis la eŭropan unuiĝon, sed ili ankoraŭ ne trovis la adekvatan mensan grundon por ke tiu ideo enradikiĝu en la homamasoj aŭ alie dirite en la popoloj. Kio okazas? La homamasoj, ĝenerale, antaŭ la necerteco de la estonteco rigardas malantaŭen al la pasinteco, idealigas ĝin kaj revivigas aŭ eltrovas regionajn naciismojn, kvazaŭ en la tiel nomataj etnaj liberecoj estus la kerno de la homa libereco. Homoj, kiuj sin sentas progresemaĵ, fakte celas retroiri al la mezepoko. La Orienta Eŭropo disigās kaj en la Okcidenta Eŭropo la disigaj fortoj bremsas la eŭropan unuiĝon.

Kiam laŭŝajne Eŭropo jam eliris el la krizo de la du antaŭaj ĝeneralaj militoj, kiam jam oni superis la totalismojn kaj rasismojn, alifoje ili revenas substituante la grandajn naciismojn per pli multnombraj kaj malgrandaj. Kiam nuntempe kaj des pli estonte la homaro atingas la universalecon en la kampoj de la ekonomio, de la komunikado kaj eĉ de la komuna risko sur la milita kampo, vasta opinio celas stabli plurajn novajn landlimojn. Kiam la geografiaj baroj malaperas kaj la komuniko senmezure povas proksimigi, tiel same la mensojn de la homoj, kiel tiujn de la popoloj, oni revas starigi des pli multajn barojn kun la intenco, ke ĉiu supozata etno estu homogena en ĉiu stato. Oni eĉ revas pri purigo de etnoj. Oni forgesas, ke pluraleca socio kun konkorda kunvivado en libereco de ĉiuj ideoj kaj religioj estas la direkto al supera civilizacio. Tia konkorda kunvivado ne estas io alia ol la tiel nomata interna ideo de la esperantismo.

Antaŭ tiu kultura krizo, kion diras la esperantistoj? Ĝenerale ili diras nenion, oni atendas, ke la situacio klariĝu por poste kiel kutime daŭrigi la saman argumentadon de neŭtrala lingvo, nekonsiderante, ke homo neŭtrala pri sociaj aferoj ankaŭ estas neŭtrala pri la lingva problemo, li konsideras, ke tio estas afero de registaroj. Ne estas eksterordinaraĵo, ke kutime tiel same la ordinaraĵoj homoj kiel la registaroj ignoras nin.

La valoro de ideo-forto kiel la esperantismo kuŝas en la impulso por gvidi la socian evoluon ĉi-okaze al la homarunuiĝo kaj ne en la drivado esti forportata de historiaj ŝtormoj.

La afero Esperanto vere estas kultura, sed ne el abstrakta kulturo. Kiel portanto de la ideo-forto de la homarunuiĝo la esperantismo povas kaj devas fariĝi la precipa spirita movado por solvi la plej grandan civilizacian krizon de nia tempo, kio ne estas io alia ol la homarunuiĝo,


elmontrita en la himno *La Espero* kaj klare formulita en la Homaranismo de Zamenhof, kiel plifortigita esperantismo.

La mondo jam unuiĝis materie, sed spirite ne. La homoj ankoraŭ ne enkapigis la ideon de homarunuiĝo, tute kontraŭe, prefere rigardas malantaŭen, pro tio ignoras la lingvon Esperanto kaj des pli multe ĝian mesaĝon. Ne nur la homamasoj, sed eĉ ĝenerale la intelektularo. Se la afero Esperanto estus nur lingva, ĝi povus ruiniĝi, ĉar nuntempe la angla lingvo kvazaŭ rolas kiel internacia. Tio, kion ne povas fari la angla kaj neniu alia nacia aŭ etna lingvo estas fariĝi la ideo-forto por unuigi la homaron, ĉar en tio ili ne estas neŭtralaj, ĉiu el ili ĉiam estos la reprezentanto de iu naciismo. Kaj tia neŭtraleco antaŭ la naciismoj devas esti la propra neŭtraleco de la esperantismo.

En la esperantismo la afero lingva povas esti sekundara, ĉar tio grava de la lingvo Esperanto estas fariĝi la ilo por la homarunuiĝo tiel, kiel Zamenhof esprimis en la forgesita ideo la homaranismo. Tamen, je la komenco de nia dudeka jarcento, tiu ideo povis ŝajni ekstertempa, sed post la sperto de du mondmilitoj kaj la malkovro de la atomenergio kaj ĝia apliko la atombombo, oni jam eniris en alian historian epokon en kiu aŭ la homoj unuiĝas en homaron aŭ la tuta aktuala civilizacio povas disfali. Kaj tiu celado difinita en *La Espero* devas fariĝi la kerno de la esperantismo.

Giordano Moya

Solvoj



Jen la solvoj al la enigmoj de la pasinta numero. La 18an de februaro (dato kiam ni finkompostis ka revuon) ni ankoraŭ ne ricevis solvojn por la lotumo de libroj. Se ni ricevos iujn antaŭ la fino de la monato, ni tuj komunikos al la bonŝanca leganto la premion.

Malago. ĤEF Kongresurbo 1994

Malago

Kiel la ceteraj partoj de Andaluzio, Malago integriĝas al la mediteranea civilizacio ekde la Neolitiko.

Laŭ Estrabono, la fenica Malago (Malaka) estis urbo-faktorio kies desupra plano estis poligona. Ŝajne, la fenicoj konstruis ĝin ĉirkaŭ la monteto kie hodiaŭ situas la Alkazabo; en la montdeklivoj de Gibralfaro ili lokigis siajn industriojn de preparado de purpura tinkturo kaj de fiŝspeklado (tekniko kiun ili tuj lernis de la praloĝantoj).

Malaka atingis sian plenan urban maturecon dum la romia regado kaj tion pravas la ruinoj de la grandioza teatro de la respublika epoko eltrovita en 1951.

Dum la visigota regado, kaj kaŭze de la disrompiĝo de la romana mondo, la ekonomio kaj, speciale, la komerco de la provinco dekadencis videble. Nur dum la mallonga okupacio bizanca oni travivis mallongan ekonomian reagon en Malago-provinco.

En 1487, Malago, defendite de Hamet El Zegrí, estas konkerita de la kristanoj.

Malago kaj ties provinco suferis pro la politikaj revolucioj de la tumultema 19a jarcento. La napoleona invado, en kies malvenko Bailén (1808) partoprenis la malagaj geriloj organizitaj de la gubernatoro Reding, alvenis al Malago-urbo en 1810.

La urbo estis drama atestanto de la politikaj ŝanĝiĝoj kaj postaj ribeloj okazintaj tuj post la reveno de Ferdinando la 7a kaj la responda

abolicio de la Kadiza Konstitucio. La ribelo de Riego (kiun rifuzis en Malago la absolutisma garnizono, sed triumfis en la tuta lando, 1820-1823) estas la unua de longa serio. En 1831, en plena absolutisma dekadenco, oni pafas en la strando San Andrés la liberalan Torrijos kaj ties kunulojn kiuj antaŭ iuj tagoj elŝipiĝis proksime al Fuengirola, kredante ke ili estos subtenotaj de la Malago garnizono en sia klopodo estigi liberalan konstitucion al la lando; en 1836 okazas en la provinco pluraj ribeloj kontraŭ la reala statuto; en 1856, Malago ribelas kontraŭ la Liberala Unio; en 1868, ĝi partoprenas en la *Gloriosa* kaj, poste, travivas la tumultajn okazintaĵojn de la 1a Respubliko kaj la Kantona Insurekcio.

Ekde 1824, kaŭze de malpermeso komerci kun aliaj landoj per la granada haveno de Motril, la haveno de Malago ricevis favoron. Malago estis inter la unuaj urboj el Hispanio kiuj rekomercis kun la sendependa Ameriko. De ĝia haveno, oni eksportis denove la malagajn vinojn, la citrusajn fruktojn, elsekigitajn vinberojn kaj aliajn sekajn fruktojn, sukerojn, ktp.

La senposediga proceso ankaŭ atingis la provincon kaj kaŭze de tio oni alipropegis multajn monaĥ(in)ejojn. Grandaj malagaj familioj, kiel Larios kaj Heredia, helpigis estigi grandajn industriojn kaj negocojn kiel sukerrafinejojn, fabrikojn de teksaĵoj, vinkelojn, ŝipkonstruejojn kaj eĉ fandfornojn - unuajn en Hispanio kaj akordajn kun komencinta ferindustrio.

Ekde la mezo de la 19a jarcento, multegis la strukturaj problemoj de la andaluzia socio:

1- La Eklezio perdis grandparte sian influon en la popolon kaŭze de sia evidenta subteno al absolutismo.

2- La dezirego de grundo, endemia en Andaluzio, montriĝis drame en la banditgrupoj kiuj ekde la fino de la Milito de la Sendependado agadis en la provinco.

3- La anarkismo montriĝis forte dum la Kantona Insurekcio.

4- La malaga Blas Infante, tucerte la plej grava lidero de la andaluziismo, estis la plej grava propagandisto de la nacia idearo (lia

verko *El Ideal Andaluz* eldoniĝis en 1915) kaj en 1918 okazis en Ronda la Unua Andaluzia Kongreso, en kiu denove oni alproprigis la depostulojn de la kantonalismo kaj oni aprobis la verdblankan flagon, la blazonŝildon kaj la himnon de Andaluzio.

La provinco suferis ĉefe pro la terurega filokserplago kiu detruis grandparte la vitejojn inter 1878 kaj 1898. En 1884, grava tertremo okazigis grandajn perdojn en la Axarquía. La senkapitaliĝo de la banko de Malago, la manko de minerala karbo kaj la teknologia malprogreso kiuj provokis la fermon de la fandhornoj, la malgranda rentumo de la fervojo Malago-Kordovo, la malekvilibroj respondaj al la posedo de la tero, ktp, estis iuj el la damaĝaj problemoj kies solvo markis la diversajn sociajn grupojn en la unua triono de la 20a jarcento.

La arma ribelo okazinta la 18an de julio 1936 dividis Andaluzion en du duonojn: la

okcidentan, baldaŭ regatan de Franco, kaj la orientan kiu obeis la respublikan registaron.

Malago-ĉefurbo estis defendita de la popolaj milicioj, tamen ekde 1937 eksuferis pro bombado ĝis la 13 de februaro, dato en kiu eniris en la urbon la tiel nomita *Corpo de Truppe Volontarie* de la itala generalo Roatta.

La hororoj kaj la detruoj de la intercivitana milito tre influis en la vivon de la provinco. La subpremo estis



kruelega. Blas Infante estis pafita (10-11 de aŭgusto, 1936) apud multaj malaganoj apartenantaj al diversaj maldekstrulaj partioj kaj sindikatoj. Post la milito, Malago suferis de longa etapo de ekonomia stagno; tamen, post la malkomfortaj kvindekaj jaroj, Malago rangaltiĝis internacie (Torremolinos, Marbella, Fuengirola, Estepona, Benalmádena). La agrikulturo suferis pro la grava krizo kiun okazigis la elmigrado de la kamparanoj al la provinca ĉefurbo. Nun la troa sezoneco de la turismo malhelpas la ekvilibron de la malaga ekonomio, kaj la disvolvo de la industrio,

tiel esperiga fine de la 19a jarcento, estas bremsita grandparte, ĉar oficiale kaj de antaŭlonge oni konsideras Malagon, preskaŭ ekskluzive, *turisma provinco*.

Cetere, la restarigo de la libero jam modifis la politikan spektron de Malago sam'kiel tiujn de la ceteraj urboj kaj vilaĝoj de la provinco.

Notoj pri malagaj artaĵoj kaj aliaj vidindaĵoj

Alkazabo. Ne estas akordo pri ĝia origino. La araban konstruaĵon oni faris en 787. Ĝin starigis Abderamano la 1a kaj ĝin pligrandigis Abderamano la 3a. La remparoj (el ŝtono kaj brikoj) havas kvadratajn turojn.

Gibralfaro. Duobla vico de remparoj unuigas ĝin kaj la alkazabon. Gibralfaro situas en la pinto de la monteto. Temas pri fortreso kiu, siatempe, enhavis

cisternojn por 5000-homa garnizono.

Domo Picasso. Troviĝas en placo La Merced. Temas pri la domo en kiu naskiĝis ĉi tiu fama artisto.

Katedralo. Oni komencis konstrui ĝin en 1528 kaj oni finis ĝin (en ĝia nuna stato). Temas pri ekzemplo de arkitekturo regita de klasikaj kriterioj kiujn oni adaptis al tipa gotika desupra plano.

Preĝejo El Sagrario. Grava ekzemplo de malfrua gotiko. Ĝi estis konstruata sur la ĉefa moskeo. Retablo de Juan Balmaseda.

Preĝejo Nuestra Señora de la Victoria. La Katolikaj Reĝoj ordonis ĝian konstruadon por memorigi la venkon super la muzulmanoj. Ĝiaj navoj elstaras pro sia stuka dekoracio (andaluzia baroko).

Malagaj ĝardenoj. La plej gravaj estas la situantaj en El Parque, Puerta Oscura, La Cónsula, El Retiro, San José kaj La Concepción. Andreo

Hotelinformo

Pro spacomanko, ni ne informas la gelegantojn pri la loĝadeblecoj en Malago. Tamen, se iu bezonas ian ajn informon, nia asocio jam pretigis informfolion. Simple kontaktu nin poŝte kaj vi tuj ricevos ĝin.

Daŭrigo de la paĝo 13

Kolbe, pola pastro, parolis nian internacian lingvon. Sankta Maximiliano Kolbe mortis en Auschwitz en 1941 por savi la vivon de alia malliberigita polo. La Katolika Eklezio memoras lin la 14-an de Aŭgusto.

10. Krom religiaj movadoj, ankaŭ ekzistas en Esperantio movado por Ateismo. Temas pri ATEO (Ateisma Tutmonda Esperanto-Organizo), kies celoj estas kunligi esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn, disvastigi Esperanton inter ateistoj, kaj akceli racian pensmanieron inter esperantistoj. Ĝi eldonas la revuon *Ateismo*.

Realisma ĤEF-Kongreso

Cele al plej sukcesiga aranĝado de la venonta Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio estas necese determini la limojn de la agado realigota kaj, samtempe, ebligi liberan kaj respondecan partoprenon de ĉiu kongresano. Tial, la OKK, per ĉi tiu dokumento, havigas al ĉiuj samideanoj la jenajn rimarkojn:

Pravigo

A. Gravaj aktivuloj en Esperantujo konscias la danĝeran situacion de la E-movado en Eŭropo post la rapida malapero de la influo de la esperantaj organizoj en landoj de orienta Eŭropo kies registaroj ĉesis subteni nian internacian lingvon antaŭ nelonge. Tiu cirkonstanco instigas tieajn aŭtentikajn kaj kuraĝajn samideanojn pripensi novajn strategiojn por, ne nur pluvivigi esperant-on en siaj landoj, sed por plifortigi ĝin per adekvata adaptado al la novaj tempoj.

B. En nia lando sam'kiel, ĝenerale, en aliaj situantaj en Okcidento, la esperanto-movado maljuniĝas progresive. Se la aktuala generacio de esperantistoj ne sukcesas entuziasmigi la hispanan junularon per konkretaj kaj allogaj programoj realigotaj helpe de esperant-o, la hodiaŭ rekono (ja, malgranda) de nia lingvo flanke de la socio tute malaperos. Kaŭze de tio, estas necese okazigi kongreson en kiu oni studu ĝisfunde la nunon de esperanto en Hispanio cele al startigo de nova agadmaniero pli sukcesiga.

Baza idearo

E-movado similas al Arbo kiu, principe, produktas fruktojn. Kiel ĉi tiu ĝi havas radikojn, trunkon, branĉojn kaj foliojn. Por produkti fruktojn ĝi bezonas nutriĝi akorde kun sia naturo kaj tiom ĝi eltenas la ventegajn kaj ŝtormajn atakojn kiom ĝi estas enradikigita en la grundo.

La nutraĵo de la E-movado estas ties ideologio.

La fruktoj de la E-movado konkretiĝas en la aplikado de la lingvo.

Sen idearo, neniu organizo eltenas la tempopason. Nu, en nia kazo, la *interna ideo* estas io fundamenta.

La kvalito kaj la kvanto de la fruktoj dependas de la nutraĵoj kaj de la farteĉo de ĉiu el la partoj de la arbo.

Kvante kaj kvalite, la aplikado de esperant-o dependas de la travivado de la Interna Ideo kaj de la farteĉo de la esperanto-organizoj.

La nuno

Jen iuj el la faktoj kiuj determinas nuntempe la esperanto-movadon en Hispanio:

- La ŝtata registaro apenaŭ kunlaboras kun la esperanto-organizoj
- La politikistoj estas pretaj subteni iun esperantan agadon nur kiam ili konjektas atingi per ĝi gravan pliiĝon de sia prestiĝo; ili ne konscias la gravecon de nia agado nek la lingvan internacian problemon
- Neniu politika partio kuraĝas defendi esperanton publike kaj oficiale en Hispanio
- Kvankam en niaj vicoj troviĝas personoj (bedaŭrinde malmultaj) tre kleraj, apenaŭ oni sukcesas engaĝi aliajn en la Movadon
- 99'999% el la hispanoj (esperantistaj kaj neesperantistaj) opinias, ke esperanto ne utilas por

perlabori la panon

-Preskaŭ ĉiuj niaj samlandanoj ŝatas esperanton kiel nuran esprimon de iu bela, sed neniam atingota, homaranisma revo

-Malmultaj hispanoj lernas esperanton kaj granda procento el tiuj forlasas ĝin konstatinte la endemian stagnon de la esperanto-movado

-Kvankam ni ĉiuj konscias la malefikon de niaj kongresoj kaj renkontiĝoj, nur iuj kuraĝas ŝanĝi ilin; la aliaj aliras ilin precipe (aŭ ekskluzive) por amuzi kaj revii.

-La fanfaronado de multaj esperantistoj mokigas la ceterulojn.

La estonto

Ne nur eviti la ruiniĝon de la esperanto-movado, sed ankaŭ pliigi la efikon de nia internacia lingvo estu nia kongresa celo. Estas urĝe eltrovi novan kaj pli efikan agadmanieron en la venonta kongreso de HEF. Kvankam la OKK ne intencas altrudi kriteriojn al la ceteruloj, ĝi opinias, ke en Malago estas nepre:

A. Pristudi la realajn eblecojn enkonduki esperanton en la ekonomian kampon, la lernejojn kaj la amaskomunikilojn.

B. Konkludi konkretan kaj realisman agadplanon por engaĝi klerulojn al la e-movado, kuraĝigi samideanojn uzi esperanton en siaj negocoj, kunlabore de samideanoj krei kaj funkciigi pioniran entreprenon per kies profito oni subtenu ekonomie esperanton en Hispanio kaj startigi rimedojn por altiri klerulojn kaj kun ties kunlaboro partopreni aktive en lernejoj kaj amaskomunikiloj.

C. Adopti pli efikan strukturon de la esperanto-movado por kunigi fortojn kaj penojn cele al la aplikado de la konkludoj atingotaj en ĉiu HEF-a Kongreso.

Andrés Martín González

Daŭrigo de la paĝo 19



estas:

-Interŝanĝo de gejunuloj de diversaj uniaj landoj por pliigi la konon de la ekonomia, socia kaj kultura vivo de aliaj ŝtatoj-membroj

-La starigo de kunagadaj ligoj, la interŝanĝo de ideoj kaj la ebligado de kunagadaj ligoj inter la gejunuloj.

Estas memvideble, ke por atingi ajnan avancon en la enkonduko de nia internacia lingvo en la Eŭropa Unio oni devas koni ties celojn kaj funkciadon. Esperante helpi nian legantojn scii iom pli pri tiel grava internacia organizo, la aŭtoro verkis ĉi tiun artikolon.

A.M.G.

Poezia Ĥungulo

NOKTURNO DE KORDOVO

Kaj tiu lanterno?
 Kaj tiu stratangulo
 kun sia tuta nokto
 rajde?
 Kaj tiuj muroj,
 kalkaj,
 blankaj,
 inunditaj da hedero?
 Kaj tiu silento
 inter krucoj?
 Kaj tiuj sennomaj ponardoj?
 Kaj tiu nedaŭra
 sonorilado?
 Kaj tiu Virgulino
 kun la manoj
 en la koron
 dume tremas
 la lanternoj
 la stratanguloj
 kaj la luno
 en la ventmontriloj...?

KIAM LA KOTO...

Ni ekestu homajl ni tiam ekkrios;
 Ni ekestu homajl antaŭ ol la memoro
 konvertos la eĥojn de la krio en silenton,
 la lumon en la tenebron kaj la momenton en la eternecon!

Ni ekestu homajl ni tiam ekkrios;
 sed jam l'oldaj horizontoj ĝemis.
 Kaj la turoj kiujn infanaĝe ni levis
 –blanka fumo kaj kristaloj– sur la mirinda
 piedestalo de la sonĝoj revenos momente
 por liberigi kolombojn, vunditaj pro nostalgio.

Mario LÓPEZ, kordova poeto, sendube unu el la plej gravaj kunlaborantoj de la poezia revuo

Cántico, kie verkis elstaraj andaluziaj poetoj dum la jardekoj 40a–50a.



EZOPA FABLO

La ĉeval' kaj bovo ie
 Ekdisputis energie
 Pri l' merito
 En milito.

Diris la ĉeval' incite:

«Eh, malsprite
 Estus dubi nian gloron
 Kaj valoron.
 La ĉevaloj
 Al bataloj
 Kuri ĉiam estis pretaj
 Je l' trumpetaj
 Sonoj
 (Iom helpis ankaŭ spronoj)
 Kaj la ŝarĝon de l' kanonoj
 Tra abruptaj ŝtonoj
 Kiuj trenis?
 Nur nil» - la ĉevalo henis.

Bov' respondis dum remaĉo:

«Ĉevalaĉol
 Vi ja vane fanfaronas,
 Ĉar ni donas
 Tamen la plej grandan servon!
 Ja al si la cerbon
 La marŝalo vane rompas,
 Vane pompas
 La kuraĝo,
 Se l' furaĝo
 Mankas.
 Kaj al kiu dankas

La viandon la soldat' malsata?
 Al la bovo malŝatata!
 Via gloro sole ŝajnes,
 Ĉiun venkon bovo gajnas.»


Paŝtis sin melankolie
 Ankaŭ la azeno tie.
 Ĝi malplaĉe aŭdis,
 Ke sin ili laŭdis.
 Ĝi iais
 Kaj balais
 La aeron per oreloj,
 Kaj ekkriis: «Bagateloj!
 Jen la vero:
 Sur la tero
 Se azenoj ne amasus,
 La milit' eĉ ne okazus!»

K.Kalocsay

Kalmán KALOCSAY (1891-1976), plej grava esperantlingva verkisto. Reverkis la fablojn de

Ezopo en nia lingvo (Ezopa Saĝo, 1956)

Krucvortoj



Horizontale:

1. Konsonanto. 2. Kaŭza adverbo. 3. Donas difinitan lokon al objekto. 4. Inverse, nedifina adjektivo. Vokalo. Ripetita vokalo. 5. Inverse, adverbo. Iu parto de la homa korpo. 6. Numeralo. Inverse, konsumi por sia utilo. Numeralo. 7. Inverse, rilata al kato. Inverse, primitiva. 8. Ripetita vokalo. Konsonanto. Inverse, sufikso montranta adepton de doktrino. 9. Pikbatalilo konsistanta el longa klingo kaj mallonga tenilo. 10. Opo de ok aferoj. 11. Vokalo.

Vertikale:

1. Vokalo. 2. Interna. 3. Per atuto. 4. Akuzative, persona pronomo. Inverse, rilata al ambaŭ seksoj. 5. Loka adverbo. Inverse, demanda adjektivo. Inverse, k onjunkcio. 6. Havi altan opinion pri iu. Konsonanto. Per sako. 7. Inverse, prepozicio. Rilata al muo. Nomo de litero. 8. Refleksiva adjektivo. Membro de grupo. 9. Vortero en la komenco de sciencaj vortoj. 10. Inverse, kaŭza prepozicio. 11. Vokalo.

Ni denove lotumos premion inter la legantoj kiuj solvos ĉi tiun enigmon kaj sendos la adreson al ni antaŭ la 15an de majo. Adreso: J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago.

10 Sciindaj aspektoj pri...

... Esperanto kaj Religio

1. Nuntempe ekzistas 6 internaciaj asocioj, kunlaborantaj kun UEA, kiuj kunligas esperantistojn laŭ siaj religioj. Ili estas BEL (Bahaa Esperanto-Ligo), KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia), IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), KES (Kvakera Esperantista Societo), PEM (Por Esperanta Mormonaro) kaj EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto). Krome, ankaŭ pritraktas religiajn temojn la Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj, la Tutmonda Ekumena Ligo kaj la Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj. Entute estas pli ol 3000 gesamideanoj.
2. Unu el la religiaj principoj de la Bahaiismo, religia movado devenanta el Irano, postulas la adoptadon de internacia helplingvo. Tio ne signifas necese la proklamon de Esperanto kiel tiun helpan lingvon, kvankam oni devas agnoski la simpatian de la bahaanoj rilate nian internacian lingvon. Ĉi tiel, grandaj verkoj de tiu religio ankaŭ estas disponeblaj en Esperanto kaj dum la Esperanto-Kongresoj regule okazas bahaaj fakkunvenoj.
3. Ankaŭ aliaj religioj oficiale apogas aŭ apogis nian lingvon, inter ili la japana movado Oomoto, kiu eĉ posedas propagandan oficejon por Esperanto ekde 1925, kun abunda eldonado de libroj kaj revuoj. Ankaŭ la pola religia movado nomita Mariavitismo, kiu naskiĝis en 1887. En la komenco de tiu movado, la pastroj devige lernis Esperanton.
4. La Katolika Eklezio ankaŭ simpatias al la Esperanto-Movado. La Papo Pio la 10-a koncedis al la geesperantistoj Apostolan Benon. Postaj Papoj kiel Benedikto la 15-a, Pio la 11-a kaj Pio la 12-a tre favore traktis Esperanton. Laŭdire, la nuntempa Papo Johano Paŭlo la 2-a komprenas la internacian lingvon. Same la oficiala Radio Vatikana regule elsendas en Esperanto.
5. En Londono (Britio) okazas la duan dimanĉon en ĉiu monato (escepte aŭguste) Esperanta Religia Servo en la Metodista Preĝejo. Tamen ne temas pri sole metodista kunveno, male ĉiuj religianoj estas bonvenaj.
6. Dum la Universalaj Kongresoj ankaŭ regule okazas religiaj servoj, ĉu katolikaj, evangeliaj aŭ hebreaĵaj. Antaŭ kelkaj jaroj la Katolika Eklezio permesis oficiale okazigi la Meson en Esperanto. Aliaj servoj, ekzemple, baptoj, ankaŭ eblas. Tiel, antaŭ kelkaj jaroj okazis dum la Hispana Kongreso bapto de la filo de konata esperantisto en la internacia lingvo.
7. Nuntempe estas eble legi la jenajn internaciaj religiajn revuojn en Esperanto:
-*BEL-Monda Letero* (Bahaiismo), *Dia Regno* (Evangelismo), *Espero Katolika*, *La Kvakera Esperantisto*, *Ekumenismo*, *Asistilo* (Religio Kompara), kaj *Oomoto*
8. Du el la plej gravaj religiaj libroj estas disponeblaj de antaŭ longe en Esperanto: la *Sankta Biblio* kaj la *Sankta Korano*. Ankaŭ aliaj libroj pri preĝaroj estas publikigitaj en nia lingvo.
9. Ĉu iu sanktulo parolis Esperanton? Verŝajne jes, laŭ konitaĵoj, Sankta Maximiliano Maria

La instruado de Esperanto en Hispanio

Analizo, pritakso kaj perspektivoj.

Enkonduko

Estas fakto akceptita de ĉiuj kleruloj (kaj speciale de lingvistoj kaj pedagogoj), ke la ĉefa faktoro de disvastigo de lingvo estas ties instruado. Kaj ju pli ampleksa kaj bonkvalita tiu instruado estas, des pli granda estas ĝia disvastigo. En sia libro *Esperanto*, P. Janton diras ke la geesperantistaro kreskas nature per la instruado, "ĉar estu kiu ajn la ilo uzita por atingi la publikon, oni ne estas esperantisto se oni ne lernas esperanton"

Rilate la gepatrajn lingvojn, ĝia instruado estas oficiale garantiata en la kadro de la koncerna instruleĝaro de ĉiu ŝtato, samkiel la instruado de eksterlanda lingvo, kies instruado estas ankaŭe oficiale agnoskita en la koncerna lando (ekzemple, en nia lando krom la kastilia aŭ hispana, kaj la respektivaj lingvoj de la aŭtonomaj komunumoj kie ankaŭ estas oficialaj, ankaŭ estas oficiale instruataj precipe la angla kaj la franca). Sed rilate esperanton, la afero tute ŝanĝiĝas: ĝia instruado ne estas oficiale garantiata ĉar ĝi ne estas oficiale agnoskita de la aŭtoritatoj. Sed ĉi tiu cirkonstanco ne nuligas nian starpunkton, t.e., ke la ĉefa faktoro de disvastigo de lingvo estas ties instruado. Ni devas ekspluati ĉiujn eblecojn, kaj oficialajn kaj neoficialajn (dank' al ĉi tiuj lastaj nia lingvo relative amplekse disvastiĝis laŭlonge de sia vivo, t.e., dank' al la vigla kaj malavara laboro de multaj geesperantistoj kaj E-grupoj).

Analizo

En nia lando la situacio de la afero, kiun ni pritraktas, estas la jena: unuflanke, oni povas konstati la strebojn, kiujn la geesperantistaro kaj la E-grupoj faras laŭ siaj eblecoj, sed kies instruado estas neoficiala, t.e., ne havas la agnoskon de la registaro; aliflanke ekzistas aliaj streboj, kiujn ni povas konsideri agnoskitaj de la edukaj aŭtoritatoj aŭ almenaŭ strebas al oficiala agnosko. Ni pritraktu ilin eĉ se skize.



A) Neoficiala E-instruado. Kio ne signifas ke ĝi estu malpli grava aŭ pli malmultenombre ol tiu oficiale agnoskita. Tute male, temas pri la kerno de la E-instruado ne nur en nia lando sed en la tuta mondo, ne nur nuntempe sed ankaŭ historie. En ĉi tiu instrusistemo oni povas distingi du formojn. Ni vidu ilin resume.

Unu estas la instruado dise organizita de diversaj geesperantistoj en la kadro de la lokaj E-grupoj, civitanaj asocioj, kluboj, lernejoj (en la t.n. *kroma* horaro, t.e., ekster la oficiala horaro), ktp. Temas pri la tradicia instrusistemo, al kiu nia lingvo vole-nevole ŝuldas multon. Temas pri disa instruado, normale preskaŭ en ĉiu loka E-grupo kun

ordinare malmultenombra gelernantaro.

La alia estas la perkoresponda E-instruado, organizita de pluraj gravaj E-asocioj, kun pli-malpli ampleksa dokumentaro, sonbendoj, ktp. Endas citi la perkorespondajn E-kursojn de jenaj E-organizoj: nia Andaluza E-Unuiĝo, Callosa de Segura kaj KAE. (Interparenteze dirite, oni devas inkludi ĉi tie la E-kursojn per radio- kaj TV-elsendoj en Katalunio).

B) E-instruado oficiale agnoskita de la registaro aŭ kiu iras tiun vojon. Kiu malfermis la pordon al ĉi tiu vojo estis nia kara profesoro Juan Régulo, kiu jam antaŭ longe atingis ĉe la universitato de La Laguna ian rekonon por nia lingvo (ĝi tamen estis pli simbola aŭ honora ol reala, kaj ŝuldiĝis sole nur al la merito kaj personeco de profesoro Régulo, kiu estis profesoro en tiu universitato). La duan gravan paŝon en tiun direkton donis s-ro A. Alonso, la nuna prezidanto de HEF, kiam en la jaro 1980 atingis ĉe la universitato de Santiago de Compostela oficialan permeson por la gvidado de libervola E-kurso en la t.n. instituto por lingvoj de tiu universitato; plurajn jarojn poste s-ro Alonso atingis oficialan apogon kaj subvencion por la organizado de preuniversitataj internaciaj kursoj en E-o. Nova paŝo en tiun direkton ŝuldiĝis al la tiama delegito de ILEI en nia lando, profesoro F. Zaragoza, kiu post granda laboro de disvastigado de E-o kaj la koncernaj demarŝoj, atingis ĉe la registaro de la valencia aŭtonoma komunumo en novembro 1984 oficialan permeson por la okazigo de E-kurso en publika lernejo de Callosa de Segura. Kaj alian gravan paŝon oni donis kiam teamo de geprofesoroj atingis pasintjare ĉe la registaro de nia aŭtonoma komunumo aprobon por oficiala starigo de laborgrupo

por malvolvo de projekto pri la enkonduko de E-o en la lernejojn kune kun subvencio kaj livero de oficialaj atestoj al la partoprenantoj, kaj en la monato novembro ĉi-jara ĝi estis ree aprobita por unu plia jaro. Verŝajne en aliaj aŭtonomaj komunumoj ankaŭ oni donis kaj plu donas paŝojn en ĉi tiun saman direkton kaj eĉ kun pozitivaj rezultoj.

Pritakso kaj perspektivoj

Kvankam ĉiuj agoj strebantaj al E-instruado estas bezonataj, necesaj kaj bonvenaj, mi opinias ke la paŝoj, kiujn ni donos survoje al la oficiala agnosko fare de la registaro, estos pli gravaj kaj altiraj por ni kaj por la ĝenerala publiko. Ni devas strebi ne nur al disvastigo de E-o en la E-rondoj (amikoj, najbaroj, ktp.), sed al vere amasa E-instruado en la lernejoj, liceoj kaj universitatoj kun oficiala agnosko fare de la instrua administracio kaj dum la oficiala lernejhoraro.

Konvenas diri, ke antaŭ la manko de oficiala ĝenerala agnosko de la E-instruado, la hispana sekcio de ILEI kune kun Hispana E-Federacio zorgas pri la organizado de la (ni diru) *oficialaj* ekzamenoj de E-o kaj livero de la koncernaj *oficialaj* atestoj, komprenante sub la vorto *oficiala*, ke temas nur pri la agnosko fare de HEF kaj de la hispana sekcio de ILEI. Ĉi tion oni devis fari por unuecigi en nia lando la nivelojn de la koncernaj atestoj kaj responde al peto de la registaro en ĉi tiu senco (temas fakte pri respondo de la Ministerio pri Edukado kaj Scienco al peto farita de la hispana sekcio de ILEI, kiam ni demarŝis por starigo de oficiala kolegio de E-instruistoj).

Abundajn pravigajn kialojn ni havas por pluri tiun direkton. Jen kelkaj el ili skize resumitaj:

- Dekreto de la jaro 1911 agnoskanta la E-lingvoscion merito.

- Rezolucioj de UNESKO de 1954 kaj 1985 favoraj al instruado de E-o. Ĉi tiu lasta, en sia punkto 3, diras: *La Ĝenerala Konferenco invitas la Ŝtatojn-Membrojn (...) instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado.*

- Ĉiuj atingoj ĉe la registaro jam antaŭe cititaj.

- Kaj fine la ebleco, kiun malfermas al ni la leĝo regulanta la instrusistemon en nia lando (la t.n. LOGSE), kiu plivigligas la studadon de fremda lingvo jam ekde la baza nivelo kaj eĉ inkluzivas la studadon de dua fremda lingvo en la meza nivelo.

La perspektivoj por la estonto pli-malpli proksima estas do se ne bonaj, almenaŭ ne nigraj. Ni devas labori laŭ niaj fortoj kaj en niaj respektivaj kampoj. Ĉiuj streboj estas konvenaj: tradicia kursgvidado en la lokaj E-grupoj, perkorespondaj kursoj, radio- kaj TV-elsendoj... kaj ankaŭ klopodi atingi oficialan rekonon por la E-instruado. Mi kuraĝigas ĉiuj profesorojn de baza kaj meza instruniveloj al laboro en nia kampo, por ke ili ne perdu la okazon peti la aprobon al oficiala projekto pri E-instruado kaj starigo de labor-grupo, kies publika alvoko sendube aperas ĉiujare en la koncernaj oficialaj bultenoj de la aŭtonomaj komunumoj kaj en la agadteritorio de la Ministerio pri Edukado. Al la interesitoj ni bonvole pretos niajn helpojn kaj materialon, kaj transdonos niajn spertojn rilate niajn demarŝojn ĉe la aŭtoritatoj. Do ek al la laboro!

Manuel López Hernández



Frank Buckley - Okdek Jaroj

Frank Buckley, angla advokato kaj Esperanto pioniro, festos sian okdekjariĝon la 16-an de junio, 1994. Kiam li atingis 70 jarojn, li ricevis pli ol 300 naskiĝtagajn gratulajn kartojn el multe da landoj, kiuj faris interesan propagandan ekspozicion en la loka biblioteko. Sendube, multaj amikoj deziras sendi kartojn okaze la 80an naskfeston, kaj simila ekspozicio estos ĉe Bristolaj publikaj bibliotekoj, dum julio kaj septembro de 1994.

Frank estas verkisto teatraĵoj (*La Ĉeĥoslovaka Porko, La Feliĉa Familio, 9 Dzika Strato, Sally Bowles*, ktp.) Li estas komponisto de kantoj, ekzemple *Ĝis la reveno* kaj la kongresa uverturo *Esperantiana*. Li reĝisoris kaj prezentis programojn ĉe Universalaj Kongresoj kaj internaciaj kunvenoj; inter aliaj *Hamlet* kaj *La Sonĝo de Mezsomera Nokto* de Ŝekspiro. Kun prelegoj kaj legadoj, li vizitis la Kulturen Esperanto-Domon de Gresillon (Francio), la Kulturen Centron Esperantistan de Chaux-de-Fonds (Svislando), la Hispanan Kunvenon en Sant Cugat del Vallès kaj la Kolegion de la Popoloj (Elsinore).

Bonvolu sendi okdekjarajn gratulajn naskiĝtagajn kartojn al Frank Buckley, 620 Filton Avenue, Bristol, BS12 7LD, Anglio.



Frank
Buckley
Esq.



$$E = mc^2$$

Marso el tera vidpunkto

La pasintan monaton Majon la NASA (Nacia Administrado pri Spaco kaj Aeronautiko) perdis siajn kontaktojn kun la spaco-ŝipo *Mars Observer*, sendita al la planedo Marso por esplori kaj pliriĉigi la informojn antaŭe ricevitaĵoj de la raketoj *Mariner* kaj *Viking*. La oficiala komunikado deklaris, ke la raketo estis altirita de la marsa atmosfero kiu detruis ĝin.

Tamen usonaj sciencistoj asertis, ke la NASA pretendas ne diskonigi iajn informojn, kio laŭdire, jam okazis kun aro da fotografaĵoj de la spacoŝipo *Viking*. Konkrete ili asertis ke oni intencas okulti la eblajn indicojn pri vivo en tiu planedo, kaj pli detale, ke la NASA ne volas montri ĉiujn fotografaĵojn de la *Viking* kie aperas giganta vizaĝo sur Marso; la usona administrado asertas ke tiu vizaĝo estas nur optika iluzio pro la suna lumo; male, aliaj pensas ke tio estas konstruaĵo de eblaj loĝantoj de la planedo.

Ĉi tiaj debatoj montras la intereson kiu ĉiam provokas al la Homaro tiu planedo. Marso estas tre simila al la Tero, ekzistas glacio en la polusoj, blankaj nuboj en la ĉielo kaj ankaŭ sezonoj dum la jaro. Sed sendube la plej fantastika scienca esploro de la tiel nomita *Ruĝa Planedo* devenas de Percival Lowell. Ĉi astronomo asertis pasintjarcente, ke en Marso ekzistis vivaj entoj. Lowell fundamentis siajn studojn sur la esploroj kiuj realigis Schiaparelli en 1887, kiu vidis grandajn riverojn en Marso. Tiel, Powell asertis ke ekzistis kanaloj en Marso por transporti akvon el la glaciaj polusoj ĝis la akvosofanta ekvadora zono. Li imagis temperaturojn tre similaj al tiuj mezeŭropaj, kaj kun atmosfero ne tro riĉa en oksigeno, li eĉ asertis ke la ruĝa koloro de kelkaj zonoj estis produktata de la ĝermitaj grajnoj semitaj en la riĉaj teroj de tiu planedo.

Tamen, jam en la jaro 1907, alia sciencisto Alfred Wallace, asertis ke neniu kanalo povus transporti akvon tra centoj kaj eĉ miloj da kilometroj, pro la elvaporigo. La tempo neis la ekziston de ĉi civilizacio, sed kelkaj teorioj asertas ke en Marso ekzistas vivaj mikroorganismoj.

La perdo, ĉu vera, ĉu supozita, de la raketo *Mars Observer* prokrastigas la intencon koloniigi la ruĝan planedon, tamen tio permesas daŭrigi la fantazian revadon pri la planedo Marso.

La Eŭropa Unio

La Eŭropa Unio devenas el tri institucioj, t.e., la Eŭropa Komunumo de la Karbo kaj de la Ŝtalo (fondita en 1952 akorde kun la Pariza Traktato), la Ekonomia Eŭropa Komunumo kaj la Eŭropa Komunumo de la Atoma Energio, ambaŭ fonditaj en 1958 laŭ la Roma Traktato.

La fandiĝo de iliaj organismoj okazigis la Eŭropan Komunumon, hodiaŭ nomitan Eŭropa Unio.

EU ellaboras komunajn politikojn por siaj landoj-membroj, klopodas pri la egaligo de la ekonomia nivelo de tiuj landoj, estigas la Unikan Eŭropan Merkaton kiu ebligas la liberan cirkuladon de la varoj ene de la Unio, permesas la liberan cirkuladon de la personoj de unu lando al alia ene de ĝi...

Nun estas membroj de EU Danlando, Germanio, Belgio, Luksemburgio, Irlando, Grekio, Italio, Francio, Nederlando, Britio, Portugalio kaj Hispanio.

EU agadas per ĉi tiuj organoj: Parlamento, Konsilio, Eŭropa Konsilio, Eŭropa Komisiono, Tribunalo pri Financaj Aferoj, Justica Tribunalo, Ekonomia kaj Socia Komitato kaj Konsultiĝa Komitato.

La *Parlamento* konsistas el 518 anoj. Ĝiaj membroj ne grupiĝas laŭ siaj naciecoj, sed laŭ siaj politikaj ideologioj kaj oni elektas ilin en ĉiu lando per universala voĉdonado.

La *Konsilio* konsistas el unu reprezentanto (preskaŭ ĉiam la Ministerio pri Eksteraj Aferoj) po ĉiu lando.

La *Eŭropa Konsilio* konsistas el la Estroj de la Ŝtatoj aŭ de la Registaroj de ĉiu lando, plus la Ministroj pri Eksteraj

Aferoj, la Prezidanto kaj la Vicprezidanto de la Eŭropa Komisiono.

La *Eŭropa Komisiono* konsistas el 17 membroj. Kvankam ili estas nomumitaj per komuna konsento de la Registaroj, ili agadas sendepende de siaj Registaroj kaj de la Konsilio. La Eŭropa Komisiono estas la plej grava organismo de la Unio. Ĝia mandato estas kvarjara. Nur la Parlamento povas senrajtigi ĝin.

La *Tribunalo pri Financaj Aferoj* konsistas el 12 membroj kaj kontrolas la financojn de la Unio. Ĝiaj membroj estas nomumitaj de la Konsilio post la konsulto de la Parlamento.

La *Justica Tribunalo* konsistas el 13 juĝistoj. Ĝiaj mandatoj estas sesjaraj. La membroj estas nomumitaj laŭ komuna akordo de la Registaroj.

La *Ekonomia kaj Socia Komitato* estas komuna al la Eŭropa Ekonomia Komunumo kaj al la Eŭropa Komunumo de la Atoma Energio. Devige oni devas konsulti ĝin pri la aferoj rilataj al tiuj organismoj.

La *Konsultiĝa Komitato* koncernas la Eŭropan Komunumon de la Karbo kaj de la Ŝtalo. Ĝi konsistas el 96 membroj kiuj reprezentas la entreprenistaron. Devige oni devas konsulti ĝin pri la aferoj rilataj al tiu organismo.

Ambaŭ komitatoj ebligas la partoprenon de sindikatoj kaj entreprenistoj en la politiko de la Unio kaj povas raporti laŭ sia bontrovo.

La monunuo de la Unio estas la ekuo.

La Komunumaj Programoj

La programoj de la Unio estas Petra,

Erasmus, Comett II, Lingua, Tempus, Eŭropa Socia Fonduso kaj la Junularo kun Eŭropo.

Petra

Programo per kiu oni intencas kapabligi kaj prepari la junularon por la adolta kaj profesia vivo.

Plenumiĝas laŭ tri agadoj:

-Kapabligaj staĝoj aŭ periodoj de praktikado eksterlande

-Eŭropaj Retoj de Kunigitaj Projektoj de Kapabligo

-Transnacia Kunagado por la plibonigo de la informado kaj la profesia orientado.

La Komisiono respondecas pri la programo helpe de Konsultiĝa Komitato.

Erasmus

Programo per kiu oni intencas pliigi la moveblecon de la studentaro.

Plenumiĝas laŭ kvar agadoj:

-Universitata Eŭropa Reto

-Stipendioplano *Erasmus* por studentoj kiuj realigu parton de siaj studoj en alia ŝtato-membro

-Komunuma Reto de Naciaj Centroj pri Lerneja Rekono

-Kompletigaj rimedoj por puŝi la gestudentojn moviĝi ene de la Unio

Comett II

Programo por ebligi la kunagadon de universitatoj kaj entreprenoj cele al pinta kapabligo pri teknologioj kaj ties aplikadoj.

Plenumiĝas laŭ kvar sendependaj agadoj:

-Trijaraj kontraktoj por la Asocioj Universitatoj-Entreprenoj por la Kapabligo

-Stipendioj por personoj altkvalitaj

-Financado de novaj kaj grandaj iniciatoj de edukado kaj kapabligo kaj pli mallongaj projektoj de kontinua kapabligo

-Subteno de specialaj rimedoj kiuj helpas COMETT sukcesi ĝenerale.

Lingua

Programo por pliigi la konon de eksterlandaj lingvoj en la Eŭropa Unio. Plenumiĝas laŭ kvar agadoj:

-Rimedo por pliigi la senĉesan kapabliĝon de la instruistaro

-Rimedo por pliigi la lernadon de eksterlandaj lingvoj ĉe la universitato

-Rimedo por plioftigi la konon de la lingvoj uzitaj en la profesiaj kaj ekonomiaj rilatoj, speciale en la malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj

-Rimedo por pliigi la interŝanĝo de gejunuloj kiuj partoprenas kursojn de speciala kapabligo profesia aŭ teknika en la Unio.

Tempus

Programo por estigi la transeŭropan moveblecon de universitataj studoj.

Plenumiĝas laŭ tri agadoj:

-Stipendioj al kunaj eŭropaj projektoj inter universitatoj kaj entreprenoj de la ricevontoj landoj kaj tiuj de la Unio.

-Stipendioj por movebligo

-Kompletigaj rimedoj

Eŭropa Socia Fonduso

Financa ilo helpanta la celojn de la socia kaj labora politiko de la Unio. Plenumiĝas laŭ kvar agadoj:

-Salajra subteno al novaj kontraktoj

-Stipendioj al la kontraktado kaj kreado de aŭtonomaj agadoj

-Teknologia kapabligo kaj profesia kapabligo baza kaj kvalita

-Skemo de partoprenmanieroj aplikotaj precipe kiel operaciaj programoj.

La Junularo kun Eŭropo

Programo por ebligi la junularon kapabliĝi sufiĉe por aktiva kaj profesia vivo. Ĝiaj celoj

TEC

TEC estas la Terminologia Esperanto-Centro (kies adreso estas p/a Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando). Ĝiaj celoj (laŭ la *Jarlibro 1993*) estas:

1. La plibonigo kaj unuecigo de la terminologia laboro en Esperanto.

1.1 La studado de rezultoj de internacia terminologi-normiga agado, ilia adapto al la bezonoj de Esperanto kaj diskonigo de rilataj scioj (t.e. esploro kaj instruo)

1.2 La organizado de internaciaj, fakaj kaj interfakaj diskutoj pri terminar-proponoj.

1.3 La organizado de aproba procedo, inkluzive la lingvan kontrolon kaj finan aprobon fare de la Akademio de Esperanto.

1.4 La eldonado de normaj dokumentoj, precipe terminaraj, kaj ilia reviziado.

2. La reprezentado de Esperanto en naciaj kaj internaciaj terminologiaj kaj normigaj institucioj.

Laŭ la informoj de la *TEC-bulteno* n-ro 9, ĝis nun TEC disponigas al vi la jenaj terminaroj:

Hidraŭlikaj meĥanismoj

Stomatologio

Internaciaj kodoj kaj nomoj de Landoj,

Valutoj kaj Lingvoj

AGRO1

Psikologia vortareto

Universala Dekuma Klasifiko

UDK-klasifiko, konvertaĵo el WordPerfect al ISO (ankaŭ en formato WordPerfect 4.2)

Ekologio

Fizikaj grandoj kaj unitoj

Terminologio

Komputado

Komputiko

TEC-adresaro



Terminologia konferenco UK'92 Vieno
PARADOX-Runtime, 5 disketoj, softvaro por prilaboro de multlingvaj terminaroj
Multi Alphabet 1 a Multi Alphabet 2
ISO-kodoj de landoj
ISO-kodoj de valutoj
ISO-kodoj de lingvoj
POŝTO - programo sub datum-bazo
Paradox por gvido de amasa korespondado kaj ĝia registrado en komputilo
EDITO - programo sub *Paradox*, ebliganta editi multlingvajn tekstojn
KOMENIO konverto de bibliografiaj datumoj pri Komenio el formato T602 al multlingva ISO-teksto
Pragaj Preĝoj
Rumcajs, Malovec (fabelo-serialo)
Regularo por TEC (UEA)
 Nun estas enkomputiligataj jenaj terminaroj: *Terminologio, Fizikaj grandoj kaj unitoj, Aeronautiko, Pedagogio, AGRO2, AKUSTIKO.*

Provizora Programo de la HEF-Kongreso'94

Kongresejo: Centro Civico (Avenida de los Guindos, 48, Urb. Santa Paula), Malago 29004.

La Kongresejo situas apud plaĝo. Aŭtobusaj linioj 15 kaj 16. Dato: 16-21 de julio, 1994

Tago	Horo	Amuzprogramo	Laborprogramo
16, sabato	12,30	Malfermo de la Kongreso	Asembleo de HEF (1a parto)
	16,30		
	19		
17, dimanĉo	10-11,30	Arta Ludado (Dancoj)	Laborkunvenoj
	12,30-13,30		Laborkunvenoj
	16,30-18		Klasoj (esperanto, dancoj)
	18,30-20		Asembleo de HEJS
18, lundo	Tuttaga ekskurso		Laborkunvenoj
	10-11,30	Vizito de Malago	
	10,30		
	12,30-13,30		Laborkunveno
	16,30-18		Klasoj (esperanto, dancoj)
	18,30-20		Asembleo de asocioj
19, mardo	10-11,30	Libera tago	Klasoj (esperanto, dancoj)
	12,30-13,30		Laborkunvenoj
			Laborkunveno
	16,30		Klasoj (esperanto, dancoj)
	18,30-20		Prelego
20, merkredo	Tuttaga ekskurso		Klasoj (konkludoj)
21, ĵaŭdo	10-12	Libera tago	Asembleo de HEF (2a parto)
	12		
	13		
	14		

Rimarkoj

1. Temo de la kongreso: *La esperantigo de la socio* (Aplikado de E-o en la ekonomia kampo, Instruado de E-o, Disvastigo de E-o per la amaskomunikiloj)
2. Oni uzus unu ĉambron por ĉiu temo. Estos nur tri laborgrupoj. Ĉiu laborgrupo pritraktos nur unu el la temoj. Labora tekniko: Komisiono.
3. Por ĉiu temo estos unu gvidanto. Taskoj de ĉiu gvidanto: raporti pri la afero, havigi al la ceteruloj la eblecojn partopreni, resumi la kunlaboraĵojn, redakti la konkludojn kaj prezenti ilin en la asembleo de HEF (2a parto). Taskoj de la aliaj partoprenantoj: proponi, argumenti kaj voĉdoni por ĉiu propono.
4. Estas nepre, ke ĉiu partoprenanto sendu al OKK sian kunlaboraĵon antaŭ la 25a de junio. Uzu ĉiam formaton A-4. La teko de ĉiu kongresano enhavos kopion de ĉiuj kunlaboraĵoj prezentitaj.
5. En la malfermo de la kongreso oni prezentos la gvidantojn de la laborgrupoj.
6. Ĉiu laborgrupo kunvenos matene (9,30-11 h.) De la 11-30 ĝis la 13-a h. kunvenos lunde, *Aplikado de E-o en la ekonomia kampo*, marde *Instruado de E-o*, merkrede *Disvastigo de E-o helpe de la amaskomunikiloj*.

OKK

La danco de la milionoj

Ankoraŭ mi memoras mian avinon, kiu preskaŭ ĉiam kalkulis en centimoj. Kilo da sukero, 33 centimojn, kilo da viando unu peseton kaj dek tri centimojn. Kaj laŭdire, mia avo enspezis po horo peseton kaj duonon kaj li estis bone pagita laboristo. Se subite ili, miaj geavoj, estus revenantaj, preskaŭ certe, ke ili denove mortus pro koratako, konstatante la nunajn longajn ciferojn, kiuj estas uzataj ĉiutage en kiu ajn ekonomia rilato.

Vidu, kara amiko, kio okazas nuntempe. Miliono estas kvazaŭ formiketo interne de nia kalkulado. Milionoj kaj milionoj flugas kvazaŭ birdaro. Malofte ja oni parolas pri izolita miliono. Ĝenerale, la homo diras: unu miliono, kio estas unu miliono, kion oni povas aĉeti per miliono da pesetoj? Nenion, estas la tuja kaj prava respondo. Estas ne strange, ke eĉ tiu, kiu posedas nenion jam alkiutimiĝis paroli kaj pensi laŭ miliona cifero. La milionoj invadas ĉiun menson. Sendube ne estas alia solvo aŭ rimedo pensi alimaniere, se ni deziras troviĝi en la pinto de nia civilizacio. Legu ĵurnalon, kara samideano, kaj vi tuj konstatos, ke ĉiu paĝo estas plena de milionoj. Nur unu tago, kiel scivola intenco, vi sumu ĉiujn milionojn anoncatajn en la gazeto. Fakte vi restos kvazaŭ loĝanta en la nuboj, pro la abundeco de milionoj, kiuj ĉirkaŭas nin. Kompreneble, se vi troviĝas en sama situacio ekonomia kiel la subskribinto, nepre vi demandos vin, nu, kie estas tiuj milionoj? Sed kiam vi ricevos veran surprizon, estas se vi legas atente, kiam oni donas klarigojn pri la ŝtataj buĝetoj. Patrino mial, kiamaniere anonci milojn da milionoj. Oni disdonas milionojn, kvazaŭ ili estus kikeroj. Ciferoj kaj pliaj ciferoj milionaj, ofte mi sentas min, kvazaŭ en la *Lando de la Mirindaĵoj*, mi tuj pensas, kiom riĉaj ni estas kaj almenaŭ momente mi sentas min feliĉa. Kiel homo kun espero, kiu mi estas, mi antaŭsentas, ke el tiuj milionaj ciferoj, iomete, tre iomete atingos mian poŝon. Sed mi devas aldoni, ke ĝis nun tiuj espero neniam realiĝis. Sed karaj geamikoj, mi ne dubas ke la feliĉo inundos vin, kiel okazas al mi, rigardante tiujn "rondajn" ciferojn. La problemo estas, ke tiuj ciferoj kun longa vico da nuloj kaj kardinala numero ĉe la kapo, oni devas eltiri e l iu loko. Tiam la feliĉo ne estas tiom granda, ĉar eĉ la plej malsaĝa civitano scias, ke tiujn ciferojn milionajn oni eltiras el niaj poŝoj.

Sed amikoj, ni ne rigardos la aferon je malĝoja flanko, ĉar ankaŭ oni ofertas al vi, preskaŭ donace, milionojn kaj pliajn milionojn. Ĝi estas facila, tiuj lotumadoj estas al la atingo de viaj manoj kaj ilia rezulto, laŭ verŝajnaj promesoj, estas ke multaj milionoj venos al via poŝo. Do, kara amiko, vi jam povas kompreni nun, kiom bezonata estas nia socia milionula sistemo. Ankaŭ mi, kiu ja estas racia homo (tion mi pensas), de tempo al tempo fidas al tiuj belegaj ciferoj. Jam vi povas konstati, ke mi estas ankaŭ kaptita en nia miliona sociordo.

Estu feliĉa, kaj se via bankokonto havas longan vicon da nuloj, kun reala numero ĉe la kapo, zorgu ke ĝi ne mallongiĝu.

Luis Serrano Pérez



La alia danĝera lingvo, la cigana

La cigana lingvo apartenas al la indostana grupo kie ankaŭ troviĝas lingvoj kiel la sanskrita kaj aliaj dialektoj. La cigana lingvo nomiĝas *romaní*, el *romá* (homo). La lingvo de la hispanaj ciganoj nomiĝas *caló* kaj apartenas same al la indostana grupo, kvankam tra jarcentoj ricevis la influon de la lingvoj de la landoj tra kie la ciganoj trapasis kaj ĉefe de la kastilia lingvo, el kiu la *caló* ricevis la fonetikon kaj la sintakson. *Caló* signifas *cigano* (viro), la femenino estus *callí* aŭ *cañí* kaj la neŭtra formo *calé* (ankaŭ nomo de la lingvo).

Dum la 16a-19a jarcentoj la hispana cigana lingvo vivis tre proksime al la *germanías*, lingvoj de la urbaj banditoj. Ĉi tiel la perfiduloj prenis vortojn el la cigana kaj inverse, tio provokis ke dum multaj oni asertis ke la cigana lingvo estas la komunikiloj de la banditoj, eĉ en 1619 oni proklamis leĝe ke *oni malpermesas uzi la vestaĵojn de la ciganoj, siaj nomoj aŭ sia lingvo, kiu devas esti porĉiame forgesata*. Tiu opinio daŭris ĝis 1956 kiam en la oficiala vortaro de la Reĝa Akademio Hispana sub la vorto *caló*, ankoraŭ oni trovis la jenan difinon: *lingvaĉo kiun uzas perfiduloj, banditoj kaj ciganoj*.

Tamen aŭtoroj kiel R. Salillas diras, ke la ĝenerala konsidero de la ciganoj kiel ŝtelistoj aŭ kiel friponoj, atribuis al la cigana lingvo la konsideron de lingvaĉo de banditoj, tamen ĉi tiu ne estis la normala okupo de la ciganoj, kaj oni ne devas atribui al sia lingvo tiun karakteron.

La hispana cigana lingvo aŭ *caló* hodiaŭ estas apenaŭ uzata; malgraŭ tio, ke ekzistas vortaroj kaj gramatikoj, nur malgranda

minorio, prefere plenaĝuloj, uzas ĝin. Antaŭe estis tre uzata en best-foiroj aŭ en cigan-kvartaloj, tamen la enirado de la televido en la ciganaj hejmoj provokis la nulan uzadon, escepte de izolitaj vortoj. La cigana lingvo same ne estas instruata en la ciganaj lernejoj, kvankam bonŝanĉe ekzistas kelkaj kulturaj ciganaj asocioj kiuj disvastigas ĝin.

Nuntempe la cigana lingvo nur estas uzata en la cigan-andaluziaj kantaĵoj, sed nur uzante kelkajn vortojn kaj neniam kompletajn frazojn. Sendube faktoroj kiel la forto de la kastilia lingvo, la margena ekzisto de la ciganoj kaj la foresto de literaturo provokas ke la hispana cigana lingvo nur vivas hodiaŭ en izolitaj vortoj.

Jen konataj ekzemploj de *caló*:

Amiko : *monró*. Knabo : *chaval*. Mono : *parné*. Virino : *gachí*. Viro : *gachó*. Labori : *currelar*. Kompreni : *chanelar*.

Kaj aliaj nekonataj, kiel la preĝo *Patro Nia*: *Bato nonrió, sos soscabas on ler Otalpes, manjarifiaĉo quejesa tute acnao, abılanos on tucue chim, quereŝe tute oropéndola andiá on la chen sata on or Otalpe. On manré nonró de cala chivel, diñalo seĵonia y estromenanos nonrias bisauras, andial sata gaberestormenamos á nonrios bisauraores y nes muceŝ petrar on la bajambañí, bus listrábanos de panipen. Anaraniá.*

J.M.R.H.



Esperanto Aplikata

Tradukoj el la franca kaj la kastilia en Esperanton. Andrés Martín, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Mi vendas loĝejon en Malago, en kvartalo Carretera de Cádiz, 4a etaĝo, kvar ĉambroj, kuirejo meblita, enmuraj ŝrankoj, blendita pordo, ĉio alumina. La loĝejo disponas propran telefonon. Prezo 6.600.000 pesetoj. Kontakto ĉe 958-258134 (de la 8a ĝis la 10a), 95-2315337. José Matos de Castro, Correos Entrega Inmediata, E-18070 Granada, Hispanio.

Modoj, desegnoj, pentraĵoj. Skribu al Raquel Martín Tovar, Armengual de la Mota 33, 4a D, 29007 Malago.

Survoje, dumonata revuo de UNIKO. Tre interesaj artikoloj de esperantistaj gravuloj. Vi povas komenci la abonon iam ajn. Peranto en Hispanio, Andrés Martín González, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Ĉu vi interesiĝas pri la *Esperant-Lingva Atlaso de Andaluzio*? Vi povas kontakti la kompilanto, José M. Rodríguez, Poŝtkesto 611, 14080 Kordova.

Kosmo-Infano, sondisko de Solo. Prezo 800 pesetoj. AEU, poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio.

Oficialaj tradukoj el la angla hispanlingven. J. F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago. Ankaŭ tradukas el la franca kaj

germana en esperanton aŭ en la hispanan. Tradukoj prilaboritaj per komputilo kaj presitaj altkvalite.

Anoncu senpage en *Gazeto Andaluzia* vian komercan aŭ profesion agadon. Sendu al Poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio, vian anoncon.

Parolu pri niaj senpagaj anoncoj al esperantistoj kaj neesperantistoj. Per tio vi helpas pliigi la prestiĝon de Esperanto kaj ties Movado. Ĉiutage kreskas la nombro de samideanoj kiuj gajnas monon per nia internacia lingvo.

Ĉina entrepreno de mineralakvaj proditaĵoj serĉas modernan mialakvaĵa muntoĉenon, biermuntoĉenon, sukuntoĉenon. Ankaŭ serĉas kunlaboron tutmonde. Skribu en Esperanto al la tradukisto: S-ro Vang Bing, Meicheng, Qianshan, Anhui, CN-246300 Ĉinio.

Komerca fakgrupo *La rollagro* produktas kaj liveras radialajn rollarojn kun globetoj, radialajn rollagrojn kun globetoj kaj ekstera sfera ringo, radialajn rollagrojn kun cilindraj roloj, radialajn-aksajn rollagrojn kun cilindraj roloj, lagrojn kun rollagroj, globetojn. Komerca fakgrupo *La rollagro*, Platforma Industriala Scheia, R-5800, Suceava, Rumanio. Telefono: 0040/987/22452, telefakso 0040/987/25947.

Ni vendas presmaŝinon Roto 611. Estas malgranda ofset-presmaŝino (formato DIN A4). Ĝi estas en malbona stato kaj

bezonas iom da preparado antaŭ denove presi. Prezo, nur 500 DM. Vi devas mem veni al la presejo kaj kunpreni la maŝinon. Skribu al *Monda Merkato*, presejo, Pf. 1539, D-82355 Weilheim, Germanio, fakso +49/8809/1234.

La komerca ĉambro de la regiono Meuse en Francio eldonis kvarlingvan (franca, germana, angla, Esperanto) katalogon de la produktoj faritaj en la regiono. Ĝi kostas 40 F kaj estas havebla ĉe Chambre de Commerce et d'Industrie de la Meuse, 6, Parc Bradfer, F-55000 Bar-le-Duc, tel. +33/29768300, fakso +33/29454742.

La informservo de *Monda Merkato* serĉas kunlaborantojn por germanajn entreprenojn en la tuta mondo. Vi ne bezonas specialajn spertojn. Sufiĉas se vi estas inteligenta kaj bone laboras. Se vi volas fari bone pagitajn laborojn skribu al *Monda Merkato*, informservo, Pf. 1539, D-82355 Weilheim, Germanio, aŭ sendu al ni fakson +49/8809/1234.

Ni ofertas mane faritajn juvelon el led, el valoraj lignoj kaj el arĝento kaj sukceso. P.H.W. NEPO, Maciej Wnuk, skrytka 105, ul. Broniewskiego 77 m. 137, PL-01-865 Warszawa, Pollando. tel +48(2)6335315, fakso +48(22)264642 aŭ 382102 (indiku "por Maciej Wnuk").

Mi serĉas statuon de Lenin (normala vivgrandeco aŭ iom pli granda) farita el metalo. Se vi povas malmultekoste vendi tiu-specan statuon, bonvolu skribi al la tradukservo de *Monda Merkato*, cifro 931411.

Mi ofertas hungarajn popularaĵojn: mane broditajn tukojn, paŝtistajn ĉemizojn, farbitajn lignajn ovojn. Adreso havebla ĉe *Monda Merkato*.

Mi ofertas librojn kaj faras anoncojn en ekssovetia gazetaro: G. Tujakin, 33A-114, Kornejĉuka, Moskvo, 127543, Rusio.

Günter Conrad, *Manlibro de varbado*. La libro montras multajn eblecojn varbi por Esperanto. Havebla ĉe *Monda Merkato*. Bonvolu antaŭpagi 12 DM.

Aperas nova esperanta revuo: *Monda Diskutilo*. Adreso: Pola Esperanto Asocio, Filio en Gliwice, skr. poczt. 21, PL-44-100 Gliwice, Pollando.

Perado kun iranaj komercistoj por importo kaj eksporto. Serĉas katalogojn de perpoŝtmendaj kompanioj el tuta mondo (ekzemple pri komputiloj, fatiloj, aŭtopartoj, ilaro, sportvestaĵoj, ktp.) Povas interŝanĝe sendi iranajn komercajn ĵurnalojn. S-ro M. Rezai Saadat, P.O.Kesto 17185-533, Tehran, Irano.

Mi serĉas personojn, kiuj interesiĝas pri internacia politika laboro sur la bazo de integrala federalismo. Dr-o R. Herrmann, Kronstädter Str. 24, W-8500 Nürnberg 30.

Vendas florojn, ekzemple 1450 specojn de gladioloj. Arvo Toomsalu, Varbola 83-15, EE-3523 Raplamaa, Estonio.

Seŭla Esperanto-Kulturcentro volas interŝanĝi Esperanto-librojn kontraŭ libroj aŭ Esperantaĵoj el Koreio. Iuj, kiuj interesiĝus bv. turni sin al SEK. Dir. LEE Jung-kee, CPO Kesto 3047, Seŭlo, Koreio.

Ofertas informleteron pri lokaj kaj specialaj valutsistemoj kontraŭ tri irk-oj. Sukcesaj sistemoj en anglalingvaj landoj. Bonvolu kontakti: LIDS-O, Leterfako 1731, Kitchener ON, Kanadio.

Internacia Vendo-Reto SORTIMENTO (IVERS) invitas vin kunlabori, por multe profiti finance, kaj ankaŭ morale! Detala priskribo de la projekto, aligilo kaj mendilo estas riceveblaj kontraŭ 2 IRK-j. Unika ebleco por utiligo de Esperanto kaj altigo de ĝia prestiĝo! Agentejo SORTIMENTO, Pf. 138 H-6100 Kiskunfélegyháza, Hungario.

Aperigo (eventuale inkl. de traduko) en pola gazetaro de anoncoj de eksterlandaj firmaoj. S-ro Piotr SMIEGEL, u. Bronikowskiego 3.Z, PL-85426 Bydgoszcz, Pollando.

Ĉu vi volas vendi viajn varojn en Albanio? Ni povas helpi vin trovi taŭgajn ejojn por viaj celoj en Tirane, la ĉefurbo de Albanio. Arben Mezini, Rr Hamit Shijaku 6/19, Tirane, Albanio.

Interŝanĝas uzitajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Adreso: J. Manuel Alonso de Arco, C.P. *Prácticas n-ro 1*, Rodriguez Rubí, 1, E-29028 Malago, Hispanio.

Desegnoj kaj pentraĵoj verkitaj de ŝi mem, vendas Ángeles Salazar Blázquez, c/ Rosa, Edif. Jaén, 1-2º D, E-29010 Malago, Hispanio.

Deziras korespondi pri KANMIELO, VAKSO kaj BIOTENSORO malagaj esperantistoj: Jesús García Martínez, Alférez Beltrán Monchón, 5-1º A, E-29007 Malago,

Hispanio.

Interesas min interŝanĝi muzikkasedojn, esperantaĵojn kaj poŝtkartojn. Adreso: Jesús Pérez, Apartado 27089, E-08080 Barcelono, Hispanio.

Mi laboras en komerca firmao *Novacia* kiel vicestro de ties firmao pri internaciaj kontaktoj. Ni eksportas Siberian marmoron, abian-oleon, pentraĵojn de Siberiaj artistoj, suvenirojn. Ni serĉas kontaktojn kun hispanaj partneroj. *Novacia*, S-ro Valerij Malykhin, Te. 7 3912 272909, (5.00-14.00, Moskva tempo) fakso 7 3912 233525.

Bonkoreca socio LANA, kiu senpage zorgas pri infanoj, maljunuloj, malsanuloj kaj invalidoj en la urbo kaj regiono de Poltava, serĉas helpon (medikamentojn, monon kaj diversajn varojn). Socio LANA, a/k 37, UKR-314000 Poltava, Ukrainio.

Serĉas kontaktojn kun filatelkomercistoj kaj butikistoj havantaj intereson pri aĉetovendo. Maria Smigiel, ul. Bronikowskiego 3m2, PL-85426 Bydgoszcz, Pollando.

Aperis la nova *Esperanto Telefaksaro*, tutmonda listo de esperantaj telekopiilposedantoj. Por ricevi ĝin sendu 4 IRK-ojn al Weidmann's Mondo-Servo, mm 93/4, Postfach 301, CH-8034 Zürich, Svislando.

TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj-Esperantistoj) eldonis la numeron 00 (septembro 1993) de ĝia faka gazeto *LA DOMO - Jarcento 21*. TAKE, RN 83, Rue de Tiefenbach, F-68920 Witzenheim, Francio.



Natura Parko (Kazorlo, Haeno)

REZOLUCIO DE UNESKO

La Ĝenerala Konferenco

Memorigante la Rekomendon pri edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco de 1974 kaj la Rekomendojn de la Internacia Kongreso pri Paco en la Menso de la Homoj (Yamoussoukro, Ebura Bordo, 1989),

Konsiderinte la fundamentan rolon kiun lingva komunikado alirebla por ĉiuj povas ludi en la antaŭenigo de paco kaj de interpopola kompreniĝo,

Memorigante la rezolucion IV.1.4.422.-4224, per kiu la Ĝenerala Konferenco de 1954 en Montevideo rekonis la "rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo" kaj rekonis "ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de la Unesko",

Memorigante la rezolucion 11.11, per kiu la dudek-tria sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko petis la Ĝeneralan Direktoron plu sekvi "kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj" kaj invitis la Ŝtatojn Membrojn "instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado",

Konsiderante krome ke, en la kadro de lastatempaj studoj pri aŭtomata tradukado, ekzamenado de la specifa rolo kiun povas ludi lingvo kiel Esperanto povas montri aparte grava,

Petas la Ĝeneralan Direktoron konsideri la rezultojn atingitajn de la movado disvastiganta Esperanton: (a) en la *S i n - t e z a R a p o r t o* pri ellaborado de instruprogramoj, pri trejnado de instruistoj kaj pri novigoj en la kampo de edukado por internacia kompreniĝo, paco, homaj rajtoj kaj demokratio, (b) en la redaktota *m a n l i b r o* pri gvidaj principoj por komunikado de pac-valoroj;

Petas tiucele la Ŝtatojn Membrojn raporti pri la agado plenumita kiel sekvo de la rezolucio 11.11 de 1985, precipe koncerne la studprogramojn pri Esperanto kaj iliajn rezultojn.

-----000000-----

Kovrilo: Eniro al la Alkazabo (Malago)